

& Rebrilos la stelo:

< Rekante 23 el 51 batoj por strofo, entute 459 paŝoj dum 6 minutoj. Poemon verkis Emba. Baladigis Martin Strid per modifeto (duobligo) de melodio de Sigurda balado (Norda Kantaro #4401) kaj nova rekantaĵo. Klarigoj (*): '1 Rasorgojlo: Nazia ideologio ; Elita Ŝvabo: Adolf Hitler, nazia partiestro, diktatoro de Germanujo 1933-1945. '5 En la granda batalo de Stalingrado la soveta armeo venkis la germanan. '6 Nibelungoj: klano el praĝermana legendo, kiu fariĝis simbola por nazia ideologio.>

(#Melodio:

<:51> (

(/mi mire doTi LaaSoSo LaTi dore mimi; miimifa somi so lala lala laso sofa;)
×

(#Rekantaĵe: mi sofa mi mido Ti La; LaSi LaTi do dore mi mi; lala lala sofa mi; mi sofa mi mido Ti La a)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Profetoj frenezumas de sia rasorgojlo*, ; evangelion krias pri rajto de la klabo, ; kaj kun ŝaŭmanta buŝo sputadas la Gargojlo, ; ke l' mondo apartenas al la Elita Ŝvabo*.

(×: **Kreis la lingvon genio ; Stulton venki estas defio ; Imperi' kontraŭas nin ; Kreis la lingvon genio.**)

'2 En ĉi mallumo, kiam sub boto de vandaloj ; baraktas popolarajto, homamo, bono, belo, ; inter la sufokataj homaraj idealoj ; samsorte estingiĝas la lum' de l' verda stelo.

'3 La «malgermanan» lingvon kondamnis je sufoko ; la estro de l' dresistoj de l' rasmenaĝerio, ; kaj en la Universo ne estos por ĝi loko ; dum la kvardek mil jaroj de l' Tria Imperio.

'4 Kial al sklavpopoloj internacia lingvo? ; La granda Valhalestro al ili eĉ forstrekos ; ilian propran lingvon per ĉiopova fingro. ; Sufiĉos al la sklavoj, se ili beste blekos.

'5 Nu jes, Eŭropo estas grandparte ergastulo, ; kie popoloj ĝemas en sklava laborado. ; Sed kiel longe? Al la sangmana fantastulo ; averton sur la verdon ĵus donis Stalingrado*.

'6 Armeon lian tie forglutis la kaptilo ; giganta, kaj, kun hurlo furioza, per la ungoj ; la bruston al si skrapas ĝissange la Gorilo, ; veante pri la nova pere' de Nibelungoj*.

'7 Mateno ekkrepuskis! Esperas jam denove ; popoloj turmentataj. Eksplodas jubilkrio! ; Leviĝos uraganoj kaj forbalaos blove ; ĉi tiun malpuraĵon de l' homa historio!

'8 Kaj nia lingvo vivos, kaj sur la Vojo plue ; ni povos marŝi rekte, kuraĝe en la celon. ; Kaj staros la ekzemplo ateste kaj instrue ; Pereos, kiu volas estingi nian stelon.

'9 Ĉar tiu stelo brilas inter la grandaj lumoj ; de l' homaj idealoj kun senmakula puro, ; kaj super la obskuroj, arbitroj, frenezumoj ; triumfos ĝi, ĉar ame ĝin vartas la Futuro.)